

Novajoj de

Esperanto-USA

Dumonata bulteno • *Bimonthly bulletin* • Vol 47, N° 4 (2008/4)



Brandon SOWERS

NASKanoj reklamas eĉ murskribaĉe...

Lernanto Simono KEITH ornamas muron ĉe la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto. (vidu pĝ. 8)

Ĉi-numere: Nova nomo por la bulteno elektita • Fondusoj de Esperanto-USA, parto III • UU-anoj laboradas por reklami Esperanton • La krucenigmo-konkurso rekomenciĝas • Kial usonano uzu Esperanton? • Unu opinio pri la valoro de NASK • kaj pli...

Esperanto-USA

Dumonata bulteno • *Bi-monthly bulletin*

Redaktoro • *Editor*: Hoss FIROOZNA

Sendu kontribuojn al • *Send contributions to:*

✉ E-USA bulletin, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, University of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

✉ bulteno@esperanto-usa.org

Redaktofino por la venonta numero • *Editorial
deadline for the upcoming issue:*

la 10-a de Septembro 2008

★★★

Ni bonvenigas kontribuojn en aŭ Esperanto aŭ la angla lingvo. Bonvolu inkluzivi viajn plenan nomon, foton kaj (ret)poŝtadreson. Sendante fotojn, nepre informu nin pri la nomoj de kaj la fotinto kaj la fotito(j) kaj la loko kaj dato. Ni ne perpoŝte resendos materialojn, krom se vi inkluzivos mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn el tiu ĉi bulteno, kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj sendu al la redakcio ekzempleron de la republikigita materialo. Opinioj esprimitaj ĉi tie apartenas al la aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas la vidpunktojn de Esperanto-USA aŭ la redaktoro.

★★★

We welcome contributions in either English or Esperanto. Please include your full name, photo, and email and/or postal address. With photos please include the name of both photographer and subjects, along with location and date. Materials will not be returned by mail unless you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content from this bulletin if you give credit and send us a copy of the reprinted material. Opinions expressed here are those of the authors and do not necessarily reflect the views of Esperanto-USA or the editor.

★★★

Centra Oficejo • Central Office of Esperanto-USA

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA
☎ 510.653.0998; 2510.653.1468
✉ info@esperanto-usa.org
http://esperanto-usa.org

Direktoro • Direktoro, CO: William B. HARRIS

Prezidanto • President: Philip G. DORCAS

Vicprezidanto • Vice President: Tim WESTOVER

Sekretario • Secretary: Julie SPICKLER

Kasisto • Treasurer: Anna BENNETT

Aliaj estraranoj • Other board members:

Joel AMIS, Ĵenja AMIS, Trevor ANDREWS, Mar CARDENAS, D. Gary GRADY, Anjo HARLOW, Lusi HARMON, Ros HARUO, Christopher ZERVIC

Somerajn salutojn

Kiel vi eble jam rimarkas, nia bulteno iom maldikiĝas ĉi-numere, ĉar la redaktofino okazis dum multaj el la kontribuantoj feris en Esperantujo—ĉe la Tut-Amerika Kongreso en Montrealo, la Universala Kongreso en Roterdamo, kaj la Nord-Amerika Somera Kursaro en San-Diego, i.a.

Sendube la bulteno dikiĝos, eble tro, kiam alvenos la raportoj pri ĉiuj tiuj eventoj! Intertempe, ni havas por vi almenaŭ kelkajn fotojn de NASK 2008 kun kortuŝa eseo de lernanto el Katmanduo, Nepalo.

Dankon al ĉiuj pro la diversaj nomo-proponoj por la bulteno. Post zorga konsiderado, la estraro elektis uzi *La Usona Esperantisto*. Do, venontnumere ni unuafoje provos la novan vestaĵon. Se vi havas proponon por taŭga emblemo, litertiparo ktp, bonvolu tuj proponu!

Finfine, mi esperas ke vi trovos utila la eseon (pĝ. 6) adaptitan el prelego de Joel BROZOVSKY, longtempa Esperantisto, mondvojaĝanto, kaj iama direktoro de la Centra Oficejo. Dum li loĝis kelkajn jarojn en Japanujo, homoj foje surpriziĝis ke li ofte uzis Esperanton anstataŭ la anglan. Efektive, post niaj propraj someraj vojaĝoj en Esperantujo, nin ofte trafas similaj demandoj fare de scivolemaj parencoj kaj amikoj. "Kio estas tiu 'internacia lingvo', kaj kial vi parolas ĝin? Ĉu ne estus pli facile por usonano simple uzi kun ĉiuj la anglan lingvon?" Laŭ mi, Joel respondas la demandon tre saĝe kaj humane. Eble vi volus montri lian eseon al scivolemuloj.

Agrablan legadon!



Hoss FIROOZNA

Hoss ĝoje redaktas vian bultenon. Sendu al li viajn fotojn, anoncojn, recenzojn, leterojn... eĉ plendojn! (Nu, eble ne plendojn.)

bulteno@esperanto-usa.org

(Re)join Esperanto-USA! Members receive: a bi-monthly newsletter • discounts at our store and at our annual convention • annual *Membership List* • access to the email list *elna-membroj* • member privileges at our website • the satisfaction of promoting Esperanto in the USA! Return this form with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: _____

Address: _____

City & State: _____

Postal code & Country: _____

Phone & Fax: _____

E-mail: _____

Birthdate (M/D/Y): ____/____/____ Ham radio call: _____

Don't allow other members to see my: address phone fax email

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Check **one** category of membership/support:

Life (*birthdate required*)..... \$800.00

Sustaining..... \$80.00

Family..... \$60.00

Individual..... \$40.00

Youth (*you must be under 27*)..... \$20.00

Limited Income..... \$20.00

Friend of Esperanto..... \$10.00

(*not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter*)

Credit card info: Visa Mastercard

Number: _____ Expires(M/Y): ____/____

Anoncoj

U. U. Ĉu?!

Finfine, fondis Esperanto-grupon kelkaj UUanoj (Unitaria-Universalismo) en 2007 dum la Ĝenerala Asembleo de la Unitaria-Universalisma Asocio (UUA): la U. U. Esperanta Nikuno (*Network*) en Portland, Oregon.



La fondintoj estas Nijl BLONSTEIN (NYC, Fla.), Allen BOSCHEN (MA), Ron GLOSSOP (MO), Johano DALE (AZ), Ŝeri WELLS (MI) kaj Carol AGATE (CA).

Tiu ĉi jaro ĉe la Ĝ.A. ni havis nian propran budon. Ĉiuj menciitoj estis tie, kaj ankaŭ Maria MURPHY (FL) helpis multe. [Por raporto, vidu pĝ. 5 —Red.]

Nia grupo kreskadas internacie!

Se vi estas UUano, bonvolu aldoni vian nomon por ke ni montru, ke Esperanto estas grava afero por multaj personoj.

Nia unua celo estas disvastigi Esperanton al UUaj junularoj tra la mondo por helpi ilin amikiĝi.

Poste, ni deziras, ke la kunvenoj de la ICUU (Internacia Konsilantaro de UUanoj) uzos Esperanton en kongresoj.

Kontaktu nin kaj aliĝu ĉe:

<http://groups.yahoo.com/group/UUEsperanto>

—Ŝeri A. WELLS

E-USA havas novajn listgrupojn

usa-anoncoj@yahoogroups.com
usa-gvidantoj@yahoogroups.com
usa-libroj@yahoogroups.com
usa-membroj@yahoogroups.com

Ni anoncos la politikojn en tiuj grupoj kaj en nia retpaĝaro (esperanto-usa.org). Venos pli granda raporto pri tio kaj pri aliaj agadoj de la landa kongreso en la venonta numero de la bulteno.

—Filipo DORCAS



Kiu gastigos la Landan Kongreson en 2010?

Ni jam havas sufiĉe solidan proponon de la loka grupo en Sankta Luiso por gastigi la landan kongreson de Esperanto-USA en 2009. Ni nun serĉas aliajn aktivajn, entuziasmajn lokajn grupojn por gastigi la landan kongreson en sia urbo en 2010 kaj 2011.

Pro tio ke la lastaj du kongresoj estis ekster Usono, en Tijuana kaj Montréal, ni povus havi la postajn kongresojn ie ajn en Usono. Tamen, en 2010 la kongreso prefere ne estu tro proksima al Sankta Luiso. Ni volas aranĝi la kongresojn en diversaj lokoj por ke homoj de diversaj regionoj ĉiuj havu ian okazon vojaĝi maldistance kaj malmultekoste al iu kongreso.

Se vi pretas volontuli gastigi kongreson en via urbo en estonta jaro, aŭ se vi scivolemas pri tio, kion vi devus fari por realigi tion, demandu min retpoŝte, ĉe jimhenry1973@gmail.com aŭ legu la kongresan manlibron, ĉe

<http://www.pobox.com/~jimhenry/esp/esma/planoj.htm>

Who will host the National Convention in 2010?

We already have a fairly solid proposal from the local group in St. Louis, Missouri to host the National Convention of Esperanto-USA in 2009. We're now looking for active, enthusiastic local groups to host the convention in 2010 and 2011.

Because the last couple of conventions were outside the U.S., in Tijuana and Montréal, we could have the next ones anywhere in the U.S. But ideally the convention in 2010 wouldn't be too close to St. Louis; we want to have conventions in diverse locations so that sooner or later everyone can have a chance to travel a short distance, inexpensively, to some convention or other. (Organizing regional conventions also helps with this.)

If you want to volunteer to host the convention in your city in an upcoming year, or if you're curious about what all is involved, contact me by email at jimhenry1973@gmail.com or read the convention handbook, at:

<http://www.pobox.com/~jimhenry/esp/esma/planoj.htm>

—Jim HENRY

E-USA Investment Funds, part III

Esperanto-USA has a number of restricted funds, which means they can be used only for specific purposes.

Restricted Funds

The **NASKE (Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto) Fund** was originally known as the SFSU Fund, used to pay for scholarships to the NASK summer courses plus some support costs. The name was changed in late 2000 when classes could no longer be held at SFSU. For a few years they were held at the School for International Training in Brattleboro, VT. Courses are now being held at the University of California, San Diego. Income to this fund is generated by contributions and by the investment income from this fund as well as the Ellen LEWIS Fund. Ellen EDDY manages the use of the NASKE funds.

The **Educational Video Fund** was originally started to produce the Steve ALLEN / Bill HARMON video tape *The World of Esperanto*. It still exists to fund future video projects. It is now being used to fund continued improvements to the 15-lesson video course, *Esperanto, Pasporto al la Tuta Mondo*. Lucy HARMON is in charge of the use of these funds.

The **Thompson Fund** was established when Eugene THOMPSON donated an amount to provide for travel opportunities for young Esperantists, particularly to enable them to attend the Universalaj Kongresoj de Esperanto. Since the inception of this fund, the Esperanto Travel Service has donated a percentage of its profits each year. Other donations are welcomed. Lucy HARMON is the administrator.

Mixed Funds

The **Catherine & William Schulze Fund** was started in 1994 as a three-year money-raising project to raise \$100,000 in capital. The fund, which was initiated to honor Bill and Cathy SCHULZE for their lifelong dedication to Esperanto education, is available to provide money for Esperanto-USA education projects. Only the interest is to be used from this fund. Thus, the Schulze Education Fund, which is a Restricted Fund, shows the portion of the fund available for education projects.

The **Children Around the World Fund** was created in 1999 when Charlotte KOHRS requested that ELNA accept the balance of money from the organization that she had founded. Only the interest from this fund will be used to continue educational projects, primarily for elementary-level children. Ronald GLOSSOP oversees the Restricted CATW Education Fund.

The **Thomas A. Goldman Fund** was created by an initial donation of \$15,000 in 2001 by Teuntje GOLDMAN to honor her husband, Thomas A. GOLDMAN. Only the interest from the fund is to be spent. The purpose of the Restricted Goldman Education Fund is to furnish the *Jen Nia Mondo* correspondence course, provided by Esperanto-USA, to teach Esperanto to worthy young candidates. The fund is administered by Dorothy HOLLAND.

The **Wolff Endowment Fund** was created by an initial donation by David WOLFF. The purpose of this fund is to support mass media or other publicity projects in North America that will reach large numbers of non-Esperantists. Only the interest from this fund is to be used, as reflected in the Restricted Wolff Publicity-Information Fund.

The **Klara Zamenhof Fund** was created by the Board to pay first-time membership dues for deserving candidates. The Director of the Central Office (currently Bill HARRIS) oversees this fund.

Our newest fund is the **Don Harlow Literature Fund**, established in 2007 to honor Don HARLOW and the work he did to promote Esperanto literature, especially on the internet. The goals of the foundation are to preserve Don's archives of Esperanto literature and eventually expand them with new contributions. The foundation also plans to periodically sponsor contests, similar to Premio Harlow (2007), to encourage endeavors such as literary translation and criticism. Tim WESTOVER oversees this fund.

Other **Interest-Only** (Permanently Restricted) Funds: Also known as Endowment Funds, these are established funds whose principal cannot be used. Only the income generated by these funds can be used for the intended purposes.

The **Massey Fund**, as previously explained, was originally started with a large donation by John MASSEY. Income

Anna BENNETT

Anna is Treasurer of Esperanto-USA. She lives with her husband Larry in Boise, Idaho.

annambennett@yahoo.com



generated by this fund is allocated to the Unrestricted General Fund.

The **Ellen Lewis Fund** was established to honor long time Esperantist Ellen LEWIS. In 1989, the Board, with the consent of the Lewis family, decided that the interest from this fund should be used for scholarships to help worthy students attend the SFSU summer Esperanto courses (now called NASK and held at the University of California, San Diego). Income generated by this fund is allocated to the NASKE Fund.

If you would like to contribute to any of these worthy funds, simply make your payment to Esperanto-USA, indicating to which fund you would like to contribute.

If you would like to make use of the funds available for some project, contact the person responsible for the fund to see if your project qualifies and how much would be available to you. ★

Jen "Spranta": Esperanto-Superheroino!



Spranta estas emblemulino de la internacia lingvo elpensita de la talenta Baloo (desegnisto Rex MAY).

Rex jam verkis multajn belajn karto-desegnojn en Esperanto, kaj li afable donis al la redakcio permeson represi kelkajn. Por vidi pli, serĉu "Esperanto" en lia retejo, ĉe balooartoons.com.

Ĉikaganoj piknikas

It was a flawless, sunny Sunday for the Esperanto Society of Chicago's annual picnic.

As I walked up to the house with tell-tale green balloons outside, I was a little nervous. This would be my first Esperanto event and my first experience speaking Esperanto. Tim (my neesperantista friend who came with me) and I were greeted almost immediately by the kind hostess, Sepideh, who took us to the spacious backyard.

Esperantistoj continued to trickle in, and before long it became a full-fledged party, with ten of us or so. I found it impossible to remain nervous around this bunch; all were friendly and utterly understanding of my errors in speaking. (I almost got away with saying that I had a younger daughter rather than sister, but the error was caught and we all had a good laugh.)

We discussed ourselves, families and friends, music, books, the Internet, and so on, but we were often laughing and joking with each other, like old friends reuniting. Indeed, the "interna ideo" was clearly shown through our interactions.

As Zamenhof put it, the interna ideo is "sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton."

Our group was a mixture of nationalities, native tongues, races, ages, and backgrounds, but from the moment we entered the yard, we were Esperantistoj en Esperantujo.

Even Tim, who had never before had exposure to Esperanto, began picking it up rather easily and could understand much of what we said. Everyone in our group also took the time to speak to him in English about Esperanto and simply to chat. Some neighbors stopped by and joined us, and a time passed of krokodilado, for the most part about Esperanto. There are no foreigners in Esperantujo.

There was good food, discussions, games, music, and all of the elements which usually constitute a marvelous party. Yet, never have I felt so welcome in the company of strangers, nor felt so inspired by any other party.

Esperanto changes people and widens one's view. It truly breaks down walls and creates a worldwide family of which I am proud to be a part. I extend my thanks not only to the Esperanto Society of Chicago, but surely to all of Esperantujo, for being my family and my inspiration.

—Darcy ROSS



Kelkaj anoj de la ĉikaga grupo

Ekspozicioj ĉe Unitarianoj

Ĉe la ĉi-jara Ĝenerala Asembleo de Unitaria-Universalismo en Fort Lauderdale, Florido, ses esperantistoj alvenis por ekspozicii tuttage pri Esperanto de la 25-a ĝis la 30-a de Junio.

Alan BOSCHEN, Ron GLOSSOP, Maria MURPHY, Ŝeri WELLS, Melinda SCHROEDER kaj Nijl BLONSTEIN partoprenis. (Nijl kaj 11 aliaj esperantistoj faris simile grandan ekspozicion en 2003 en Boston, antaŭ la ELNA kongreso en la sama regiono.)

La oficiala numero de partoprenintoj estas 3020. Cent kvardek estis junuloj. Pluraj centoj parolis kun ni, kaj miloj vidis niajn grandajn afiŝojn: i.a. "Esperanto For International Friendship."

Meze de la kvin-taga programo Ron GLOSSOP parolis antaŭ 60 junuloj pri lingva malegaleco. Ekzemple, oni aŭdas (ĉe la kongreso kaj inter la junuloj) pri seksismo kaj rasismo en la mondo. Sed ofte oni forgesas pri alia speco de diskriminacio: lingvismo. Post la prelegeto, la junuloj volonte prenis de Nijl kaj Maria dekojn da informiloj.

La venontan vesperon, antaŭ la junuloj Nijl kantis *Guantanamera* en Esperanto kun mallonga klarigo pri la Esperanto kongreso en Hungarujo, kie li lernis la lingvon antaŭ tri jardekoj.

—Neil NACHUM kaj Neil BLONSTEIN

Forpasoj

Mary J. GIBSON



Forpasis dumviva membro Mary Jackson GIBSON la 23-an de Aprilo, 2008 en Phoenix, Arizono. Ŝi havis 90 jarojn.

Mary diplomigis en la fako

Politika Scienco ĉe Reed College, kie ŝi renkontis sian edzon, Lee W. GIBSON. Dum preskaŭ 50 jaroj ili loĝis en Riverdale, Kalifornio, kie ŝi okupiĝis pri ses infanoj kaj helpis Lee kun lia firmao.

Ŝi laboris 14 jarojn por la konteo Fresno kiel socia laboristo por infanoj, kaj dum 54

jaroj la Unitaria-Universalisma preĝejo de Fresno estis grava parto de ŝia vivo. Ŝi volontulis por diversaj organizoj, inkluzive de ELNA, UNICEF, kaj la *American Association of University Women*; ŝi ankaŭ volontule redaktis bultenojn por diversaj organizoj.

Post la morto de sia edzo en 1990, Mary vojaĝis multe per *Elderhostel* kaj daŭre restis aktiva.

Ŝi petis, ke ne estu funebra ceremonio por ŝi. Kun amo memoras ŝin ŝiaj familio kaj amikoj.

LEE Chong-Yeong

Kun granda bedaŭro mi sendas kondolencojn al la familio kaj amikoj de D-ro LEE Chong-Yeong, iama prezidanto de UEA, nome de Esperanto-USA.

—Filipo DORCAS

Kial usonano uzas Esperanton?

Adaptita el prelego fare de Joel BROZOVSKY

Foje oni surpriziĝas ekscii ke mi, usonano, ofte uzas Esperanton anstataŭ la anglan dum mi vojaĝas eksterlande. Kial mi preferas uzi Esperanton kun neusonanoj?

Amikeco. Parolantoj de Esperanto plej ofte interesiĝas pri mi aŭ mia kulturo. Efektive, multaj fariĝas amikoj! Kontraste, tiuj kiuj alparolis min per la angla plej ofte interesiĝas unuavice pri mono. Ili volas vendi ion, aŭ lerni la anglan por povi ricevi pli bonan edukon kaj pli altsalajran postenon, ktp.

Egaleco. Parolante angle kun iu, kies gepatra lingvo ne estas la angla, mi nepre havas la pozicion de spertulo pri la lingvo. Negrave kiom multe la alia persono studis la anglan, li aŭ ŝi nepre parolas el malpli alta pozicio—kiel lernanto al instruisto, aŭ subulo al estro. Se anstataŭe mi parolas per la gepatra lingvo de mia kunparolanto, la problemo estas inverse sama. Tia malegaleco tre malhelpas la interamikiĝon.

Pord-malfermo. Esperanto malfermas multegajn pordojn al mi, kaj figure kaj laŭvorte. Dum trijara vojaĝo mi gastis en 150 hejmoj de esperantistoj; mi pagis nur unu tranokton en hotelo! Pere de Esperanto mi ĝuis riĉan kulturon, renkontis multajn diversajn homojn kaj konatiĝis intime kun ties vivoj, kulturoj, hejmoj, pensoj ktp. Mi ricevis multajn valorajn vivspertojn kiujn mi ne havus sen Esperanto.

Helpi la mondon. Se homoj tra la mondo povos libere interkomunikiĝi kiel egaluloj, kaj interamikiĝi per Esperanto, certe la mondo fariĝos pli bona, pli justa, pli simpatia. Mi ne imagas ke Esperanto sola solvos ĉiajn mondproblemojn, sed ĝi ja povas helpi la homojn ellabori solvojn.

Kreemo. Mi amas la grandan flekseblecon en la lingvo. Verkante aŭ parolante en Esperanto mi sentas min pli libera ol en la angla, kies strukturo kaj vortstoko estas relative fiksataj. La ebloj krei novajn esprimojn en Esperanto estas preskaŭ senlimaj; estas granda ĝojo esplori ilin, kaj trovi trafajn esprimojn, rekombinante jam ekzistantajn erojn.

Nova mondkoncepto. Esperanto draste ŝanĝis mian mondkoncepton. Iam mi imagis ke la mondo plenas je homoj tre malsamaj kaj ne alireblaj. Oni ne povas multe simpatii kun homoj kiuj estas *fremdaj*, ĉu ne?

Per Esperanto, mi malkovris ke efektive la mondo plenas je homoj similaj kiel mi kaj miaj familianoj. Cetere, multaj deziras esti miaj amikoj, se ili havas la okazon renkontiĝi kaj konatiĝi kun mi. Mi ne plu sentas min katenita al nur unu mondparto kaj nur unu kulturo. Mi estas nun ligita kun amikemaj homoj tra la mondo, ĉar Esperanto ebligas al mi facile komunikiĝi kun ili.

Why does an American use Esperanto?

Adapted from a talk by Joel BROZOVSKY

People are sometimes surprised to learn that as an American, I use Esperanto instead of English when traveling abroad. Why do I prefer to use Esperanto with non-Americans?

Friendship. Speakers of Esperanto are usually interested in me or my culture. Many become friends, in fact! By contrast, those people who speak to me in English are usually interested primarily in money. They want to sell something, or they want to learn English in order to be able to get a better education and a better-paying job, etc.

Equality. When speaking English with someone whose native language is not English, I necessarily have the position of an expert in the language. Regardless of how much the other person has studied English, he or she necessarily speaks from a lower position, like a student to an instructor or a subordinate to a superior. If instead I speak in the other person's native language, we have the same problem in reverse. That kind of inequality really gets in the way of friendship.

Opening doors. Esperanto opens a tremendous number of doors for me, both figuratively and literally. During a three-year journey I was a guest in the homes of 150 Esperanto speakers; only once did I pay for a


hotel! Thanks to Esperanto I enjoyed a rich culture, I met lots of different people, and I really got to learn about their lives, cultures, homes, thoughts, etc. I've gained many valuable life experiences which I wouldn't have had without Esperanto.

To help the world. If people throughout the world can communicate freely as equals, and become friends via Esperanto, the world will definitely become a better, more just, more likeable place. I don't imagine that Esperanto alone will solve all the world's problems, but it *can* help people devise solutions.

Creativity. I love the tremendous flexibility in the language. Writing or speaking in Esperanto, I feel more free than with English, in which the structure and vocabulary are relatively fixed. The possibilities for creating new expressions in Esperanto are almost endless; it's really a pleasure to explore them, finding just the right expressions by recombining existing elements.

A new world-view. Esperanto has drastically altered my world-view. I once imagined that the world was full of foreign, inaccessible people. You can't really see eye to eye with people who are *foreign*, can you?

With Esperanto, I discovered that the world is really full of people much like me and my family. And what's more, many of those people want to be my friends when they meet me and get the chance to know me. I no longer feel tied to only one part of the world and only one culture. I am now linked to friendly people throughout the world, because Esperanto allows me to easily communicate with them.



Horizontale

- 1 Longa, pinta, mallarĝa glavo
- 6 "Konu nin, ____ nin!"
- 10 ____iro, flagretema vesperulo
- 14 Okul', stomak' aŭ kor', ekzemple
- 15 Rifuĝej'
- 16 Adorata statu'
- 17 Inkliino daŭrigi
- 19 "Nova balailo ____ balaas."
- 20 Kapabl' bildigi enmense
- 21 "____ al iu la haŭton." (puni)
- 22 Karnecaj fruktoj, ofte kreskantaj are
- 23 Foriras en lokon ŝirmatan
- 25 "Pli ____ estas kapo ol ĉapo."
- 26 Saltanta sangosuĉulet'
- 27 "____ kaj espero pereis multaj sur la tero."
- 31 Bebonutraĵo
- 34 "En puton ne ____ ĉar vi trinki bezonos."
- 35 Alta konstruaĵ'; foje litera?
- 36 Tranĉa, pika. "Malgranda birdeto, sed ____ ungeto."
- 37 Restaĵo de praurbo?

- 38 Longa, unupeca vestaĵo
- 39 Fama oratoro, juristo kaj UEA-prezidinto LAPENNA
- 40 Poezie malgajiga; kaŭzanta melankolion
- 41 "Ĉio havas ____."
- 42 Kunestado, akompanado
- 44 Dorsa grasamas', de kamelo, ekzemple
- 45 Kolor' kun aparta rilato al la internacia lingvo
- 46 "____ sur la monto, estas malvarme en la valo."
- 50 Cilindroforma, riktoldinda parto de maizo
- 52 Grup' de kunagantaj sportistoj
- 54 "Pensoj iras trans ____ sen pago kaj timo."
- 55 "Tute libera, kiel birdo ____."
- 56 "Ne insultu mizeran, ne moku ____."
- 58 Kaprimen' por konduki ĉevalon
- 59 Povi esti, povi okazi
- 60 Multnombra, senorda kolekto

- 61 Pale blonda herbo, kultivata pro ties oleo; kun ink-, ĝi fariĝas emo?
- 62 Rus', serb', ĉeĥ' aŭ pol'
- 63 Tetrinkujoj

Vertikale

- 1 "Rano en palaco ____as pri marĉo."
- 2 Rekompenc' por gajninto
- 3 Kunfiksil' por vestaĵoj, paperoj, braceleto ktp.
- 4 Prezidanto de UEA Probal
- 5 Nedifinita(j) homo(j)
- 6 "Ŝteletiston oni batas, ŝtelegiston oni ____."
- 7 Obstinul'; per aldono de litero, ĝi fariĝas sinonim' por "gazono"
- 8 "Kiu bone agas, ____ ne bezonas."
- 9 "Dude" en Esperantujo?
- 10 "Vivu mizere, sed vivu ____!"
- 11 "Ĉiu abomenaĵo trovas sian ____."
- 12 "Sen ____ en urbon ne iru."

1	2	3	4	5		6	7	8	9		10	11	12	13
14						15					16			
17						18					19			
20						21					22			
23						24					25			
					26				27	28			29	30
31	32	33				34					35			
36						37					38			
39						40					41			
42						43					44			
					45				46			47	48	49
50	51					52	53				54			
55						56					57			
58						59					60			
61						62					63			

- 13 "Malsato ____ bone gustigas la manĝon."
- 18 Brutloĝej'
- 22 "Amikon ŝatu, malamikon ne ____."
- 24 "Ju pli da bruoj, des malpli da ____."
- 25 Mola, pasteca manĝaĵo
- 27 Titolo de disertintino (mll.)
- 28 Ĉefa usona Esperanto-asocio ĝis la 1950-aj jaroj (mll.)
- 29 Necerteco
- 30 "Kiu havas ____, havas honoron."
- 31 Nefakul', malspertul'
- 32 "Barakti kiel fiŝo ekster la ____."
- 33 Konkubin'
- 34 Iri pli rapide ol marŝi
- 37 Cirk'l'; ar' aŭ societ' da homoj
- 38 Tia, kia ofte spitas aŭtoritaton
- 40 "Se gut' al guto aliĝas, ____ fariĝas."
- 41 Ĉes'
- 43 Agado kiu malobservas religian leĝon
- 44 Aŭdigi senvortan plendon
- 46 Enbuŝa (kaj foje elbuŝa) fluaĵ'
- 47 Subskribas dorsan ĉekflankon
- 48 "Al kuko kaj kaso ĉiam venas ____."
- 49 Aŭdeblaj aervibradoj
- 50 Surplaa abundaĵ'
- 51 Interhelpi por efektiviĝi ion
- 52 Mebl' kun plato kaj kruro(j)
- 53 "Ne gutas mielo ____ ĉielo."
- 56 Romkatolika diserv'
- 57 Abruptra traf', eble por puni

Solvoj el 2008/3:

Enigma de Dave RUTAN

"Ĉe Samovaro" de E. James LIEBERMAN

1	K	2	A	3	M	4	I	5	O	6	N	7	O	8	V
8	A	V	E	N	A				9	O					E
11	R	I	Z			12	Z	E	13	B	R	A	R		
14	N	A				15	D	O			16	R	A	N	D
17	A	D			18	A	J	L	O						A
19	V	I	20	A					21	V	22	I	23	A	J
24	A	L	K	25	O	26	J					27	E	M	
28	L	A	V	M	A	Ŝ	I	N	O	J					

- Horizontale:**
- 1. kune
 - 3. konas
 - 7. tero
 - 8. sidas
 - 9. zume
 - 11. larmo
 - 13. ĝeme
 - 14. samovaro
 - 15. dum
 - 17. amikoj
 - 21. ruso
- Vertikale:**
- 23. havi
 - 24. respondas
 - 26. vojo
 - 27. libera
 - 28. sencelas
 - 29. ploras
 - 30. ondo
 - 33. ĝeme
 - 20. viŝas
 - 22. bolas
 - 4. kruela
 - 5. migri

Ĉi-numere la konkurso-sinsekvo revenas kun eĉ pli granda enigmo ol antaŭe. Inter la solvontoj ni lotumos du premiojn po \$10 da rabato ĉe la retbutiko/libroservo de Esperanto-USA. Ĉiuj ricevantoj de la paperforma bulteno rajtas partopreni. Bonan solvodon! **Via solvo alvenu al la redakcio (aŭ poŝte aŭ rete) antaŭ la 10-a de Septembro.**

Volas Korespondi

WOUJJI Kossi, Dakar, Senegalio.
(00221) 315 21 49. <swoudji55@yahoo.fr>
 Mi invitas vin korespondi aŭ viziti min en bela Senegalio. Mi parolas la francan, la anglan, la germanan kaj Esperanton. Komforta aparta domego por gastoj apud la maro; bongusta manĝaĵo ĉiutage kaj senpage.

S-ro Fumio ASANO, 202 Toyomisou 46 Takenoha Matsudo-shi Chiba-ken, 271-0072 Japan
 Mi deziras korespondi kun eksterlandanoj.
Richard L. BALES #425-490, Madison Correctional Inst. AB-117, PO Box 740, London OH 43140-0740
 Usona esperantisto, membro de Esperanto-USA, deziras korespondi letere kun aliaj usonanoj pri iu ajn temo.

Aaron ALBRECHT, 644 E. Vandalia St., Edwardsville, IL 62025
 16-jara studento deziras korespondi tutmonde. Mi interesiĝas pri historio kaj muziko. Mi uzas la "suzuki"-metodon lerni kaj ludi la violonon, kaj mi jam lernas dum 10 jaroj.

Remember: your membership ends on the date specified in the first line of the address listed above. Don't forget to renew!

Mia opinio pri la alta valoro de NASK

En Julio okazis la fama Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) en San-Diego. Simple neebblas resumi ĉi tie ĉion, kio okazis dum tri plenŝtopitaj semajnoj... sed jen gustumeto danke al lernanto Indu THAPALIYA el Nepalo. Vi povas ankaŭ legi la NASK-ĵurnalon rete ĉe:
<http://esperanto.org/nask/2008>

—Red.

Antaŭe mi sentis ke mi sufiĉe lernis Esperanton kaj mi partoprenis multajn UK-ojn kaj komunikis kaj interparolis kun multaj gesamideanoj, tamen, post la kurso de NASK, mi sentas ke restas multo kion mi devas lerni. Mi ankaŭ rimarkas, ke lerni Esperanton estas pli malfacile por azianoj ol por usonanoj kaj eŭropanoj.

NASK havas altan valoron: ĝi estas ege utila kaj bona kurso por ĉiuj tut-mondaj geesperantistoj. Mi bedaŭras ke mi ne partoprenis NASK-on antaŭ multaj jaroj. Se mi estus pli frue partopreninta, mia nivelo estus multe pli alta kaj mi pli bone povus disvastigi la lingvon en mia lando.



Birke DOCKHORN kaj Steĵo CYBULSKI jonglas



Indu kun samklasano Meja JUNA

Tamen, mi estas ege kontenta ĉar dum la kurso mi lernis pri multaj novaj kaj utilaj temoj. Mi ankaŭ sentas min pli kuraĝa por instigi al gesamideanoj partopreni ĉi tiun kursaron. Mi volas ke ĉiuj sciu ke NASK certe estas la plej inda kurso en la mondo, laŭ mi.

Ĉiuj programeroj estis ĝueblaj kaj ĉiuj helpis min altigi mian lingvokapablon kaj mian konon pri diversaj temoj, ekzemple, mi multe lernis pri veganismo, danke al Hoss FIROOZANIA. Mi miris pri lia senlaca laboro. Ŝajnis al mi ke li neniam ripozis. Mi estas ege dankema al li pro lia sindediĉo al la sukceso de NASK.

Kia neforgesebla sperto! Bedaŭrinde la kurso baldaŭ finiĝos kaj mi antaŭĝojas partopreni ĝin denove. Ĉi tiu fojo ne estis nur mia unua partopreno ĉe NASK, sed ĝi estis ankaŭ mia unua vizito al Usono. Mi deziras danki al multaj homoj pro ilia afableco. Unue, al Ellen EDDY, Lusi HARMON, kaj Grant GOODALL, kiuj aranĝis ĉion por mia partopreno.

Danke al Mar CARDENAS, mia vizito al Usono komenciĝis ege agrable. Ŝi kolektis min el la flughaveno, gastigis min ĉe si kaj veturigis min al la kampuso de UCSD. Mi certe volas danki ankaŭ la bonkorajn geinstruistojn, Birke DOCKHORN, Bertilo WENNERGREN kaj Liĉjo MILLER, kiuj tre ĉarme, pacience kaj inteligente respondis al ĉiuj miaj demandoj pri ĉiuj temoj. Estis ege kortuŝa la invito de David JORDAN por festi ĉe li, kaj la manĝaĵoj estis bongustegaj! Li estas bonega preleganto kaj la temo multe interesis min.

Nia honora gasto, Amri WANDEL, parolis pri la ne ofte diskutata temo de la eblo trovi vivon ekster la Tero, eĉ ekster nia sun-sistemo.

Mi volas elkore danki al Esther SCHOR, kiu instruis min kiel naĝi tiel kuraĝe; ŝi ankaŭ multe helpis min pri aliaj aferoj. Dankon ankaŭ al ĉiuj aliaj geamikoj kiuj estis tiel amikemaj, helpemaj, kaj precipe, amuzaj...

Longe vivu NASK! Mi elkore deziras al la programo grandan sukceson!

—Indu THAPALIYA



Simono KEITH regalas gitare